

INTERNACIA
PEDAGOGIA REVUO

IPR

Eldonata de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

Jarkolekto 8

N-ro 2, 1978

Pizo, Italujo

enhavo

<i>Sergio Mariani</i> – Eduka projekto por la instruado de Esperanto en elementa kaj mezgrada lernejoj	25
<i>Helmut Sonnabend</i> – Esperanto – lerneja eksperimento	29
<i>Albert Lienhardt</i> – Esperanto ne estu simpligita sed uzata simplamaniere	34
<i>W. Krikke</i> – La Cseh-metodo malmoderniĝis	39
*** – Protokoloj el Tananarivo	41
*** – 12a Internacia ILEI-Konferenco	45
*** – Mortis Ludwig Pickel	48

Eduka projekto por la instruado de Esperanto en elementa kaj mezgrada lernejoj

Sergio Mariani

Oni povas difini “eduka” ĉiun programon, kiu, pere de lerno-procedo, celas la plenkreskadon kaj maturiĝon de persono en socia kaj individua sferoj.

Mi ne proponas al vi, pere de la jena referaĵo, demonstradon ke la instruado de Esperanto tre valoras por helpi personan maturiĝon: sufiĉas ke mi citu ideon pri universala fratiĝo, bezonon de interpopola komunikilo, kaj – kio estas pli proksima al nia temo – formiĝon de mensaj logikaj strukturoj, kiujn simpleco kaj reguleco de la esperanta lingvo-strukturo ebligas kaj stimulas. Pretigi proponon signifas estigi organizitan agadon, aranĝi taŭgajn ilojn kaj precizigi celojn.

Koncerne nian referaĵon, la celo estas la ekkonigo de Esperanto. La agadon oni devas organizi laŭ precizigitaj manieroj; t.e. devas ĝin akordigi kun taŭga metodologio. Metodologio des pli valoras, ju pli:

1. ĝi prizorgas la objekton de la agado (Esperanto);
2. ĝi konformiĝas al la subjekto (la lernanto de la deviga lernejo);
3. ĝi povas uzi ilojn kaj rimedojn, kiujn teĥniko metas je dispono.

Esperanto estas lingvo, homa interkomunikilo; do, ĝin konsistigas du nevideblaj aspektoj: la *signifoplena* aspekto, kiun konsistigas la individua sperto de la parolanto, ĉu objektiva, ĉu subjektiva, kaj la *signifodona* aspekto, kiun konsistigas la tuta konvencia regularo, fonetisma, grafisma, struktura, pere de kiu individua objektiva kaj subjektiva sperto manifestiĝas kaj sekve komuniĝas.

Lingva agado disvolviĝas en du direktojn:

1. aŭskulti kaj legi, kio estas interpreti la signifodonan aspekton de la lingvo por ricevi plenan komprenadon;
2. paroli kaj skribi, kio estas komprenigi la signifon pere de la signifodona lingva aspekto.

Pluan rimarkon meritas la elemento, kiun ni nomis "lingvostrukturo". Lingvo estas homkarakteriza produktado: homa menso funkcias per strukturoj, kiuj sekve estas la fundamento de la lingvo-komunikado; rezultas ke lingvo estas arĥitektura konstruo per bazaj elementoj, kiuj interrilatas funkcie.

Strukturo estas organiza ideo, konstruiva kaj produktiva, kiu stimulas ĉiam novajn komprenpovojn. Kelkajn konsekvencojn de instrumetodo bazita sur strukturismo indikas al ni Bruner:

- pli da intereso (ĉar la instruagado ja baziĝas sur la strukturaj tendencoj de la perceptado kaj pensado);
- pli facila enmemorigo (nocio enŝoviĝas en la strukturon kaj lokiĝas en reto de interrilatoj);
- eblecon transpasi de iu kono al alia analoga (*transfer*), sekve de la fakto ke ambaŭ baziĝas sur la sama strukturo (oni difinas regularon kiel operaciigajn modelojn de nia konagado).

Por praktiki validan metodologion, krom la enhavo de la agado, necesas ankaŭ la kono de la subjekto de la agado mem, t.e. la knabo. Ĉi-rilate, oni devas konsideri la jenajn punktojn:

- ĉiaman ĉeeston de motivoj, kiuj stimulas kaj subtenas intereson;
- neceson fari kaj agi (knabo havas konkretan logikon; abstraktopovon t.e. nuran mensan aktivecon, la knabo akiras dum pli malfrua stadio de sia evolua kreskado);
- neprecon de sensaj stimuloj, precipe vidaj kaj aŭdaj.

La malmultaj konsideroj pri lingvaj faktoj kaj la psikologio de la infano kondukas al la jenaj konkludoj pri kelkaj esencaj metodologiaj elementoj:

- alteniĝo al konkreta sperto de la parolanto (aŭ skribanto); uzo samtempa de variaj esprimoj, t.e. desegno, mimiko, lingvo, muziko, ktp;
- konstruo de la lingva mesaĝo.

La laŭcela agado (lernado de Esperanto), direktita laŭ precizigita metodologio, kiu postulas ke Esperanto estu lingvo kaj ke la infano havu proprajn lernmanierojn, dividiĝas en du partojn, kiuj strikte kaj daŭre interrilatas:

- konstruo de la lingva mesaĝo (bazaj elementoj: *grafismo*, *fonetiko*, *terminaro*; projekto: *funkciiva strukturo*);
- uzo de la lingva mesaĝo (buŝa: *konversacio*, *aŭskultado*, *teatra ludado*, *ktp*; skriba: *legado*, *korespondado*, *rilatoj*, *ktp*).

La agado, kiun ekestigas la tuta eduka programo, disvolviĝas laŭ apartaj miniprogramoj samtempe diferencaj kaj interrilataj (rimarku, ke mi preferas la vorton "miniprogramo" al "leciono").

Malgraŭ iliaj distingiĝaj trajtoj, kiuj havas originon de la multflanka instruproceso, la miniprogramoj havas proprajn bazajn ecojn:

1. motivoj kaj interesoj:
 - des pli la knabo estas malgrandaĝa, ju pli la motivoj de la lernobjekto devas esti nerektaj;
 - la lernadon de Esperanto, samkiel tiun de ĉiuj lernobjektoj, oni ne povas motivi per idealaj kaj kulturaj kialoj, sed oni devas uzi ludadon, teatro-ludadon, korespondadon, t.e. farado, konceptita kiel okazo de valorigo kaj pliriĉiĝo de la personeco.
2. pragmata aspekto:
 - enŝovigo de la lernanto en konkretan sperton (media esploro, ludado, teatro-ludado, konversacio, korespondado, aŭskultado, pretigo de afiŝoj, desegnoj, ktp.);
 - samtempa uzo de esprimpovaj rimedoj (t.e. la lingva mesaĝo, kunigita kun la mimika kaj grafika mesaĝo);
 - uzo de sensaj stimuloj, vidaj kaj aŭdaj;
 - uzo de didaktikaj helprimedoj, ankaŭ aŭdvidaj;
 - pli da grupa agado ol da individua.
3. Logika aspekto:
 - pripensado pri la lingvo kaj la konkreta mesaĝo;
 - esplorado kaj observado pri la gramatikaj signoj kaj reguloj, kaj la funkcia strukturo de la mesaĝo.

Revenante al la antaŭdiritaj rimarkoj pri la du interrilataj partoj de la instrua kaj lerniga agado, la pragmata aspekto estas la uzo buŝa kaj skriba de la lingvomesaĝo, la logika aspekto estas la konstruado de la sama mesaĝo pere de la kunmeto de la bazaj elementoj (skribmaniero, fonetiko, terminaro, gramatikaj reguloj) kaj ties uzado funkcia en la sciiga konstruo.

Moderna metodologia studado ne povas ne interesiĝi pri la utiligo de la didaktikaj helprimedoj, de la plej simplaj kaj tradiciaj (libroj, slipoj, afiŝoj, nigra tabulo) ĝis la plej modernaj kaj rafinitaj aŭdvidiloj, magnetaj kaj lumaj tabuloj ĝis lingvaj laboratorioj kaj lemmaŝinoj).

Kelkaj mallongaj rimarkoj:

- a. la didaktikaj helpiloj devas esti valorigitaj: la lernejan agadon oni ne povas plu fondi sur nure tradiciaj momentoj (buŝa leciono, ekzercado, pridemandoj); vera lernproceso (pli bone diri 'memlernado') fondiĝas sur konkreta sperto de la lernanto, sur situacioj kiel eble plej realaj kaj konkretaj, sur sensaj stimuloj, kiujn nur aŭdvidaj komunikiloj povas doni;
- b. la helpilojn oni aliflanke devas demitigi: la plej grandaj danĝeroj estas plagiato kaj pasiveco (ĉi-rilate la sperto pri *mass-media* estas signifa); alia danĝero konsistas el troaj meĥanikeco kaj tehniko, kun sekva perdo de kreiveco;

- c. solvo de la malfacila problemo pri taŭga kompromiso inter valorigo kaj demitigo de la didaktikaj helpiloj, povus esti interesiga por la lernantoj pri la konstruado kaj pretigo de la helpiloj mem; kaj, kiam tio ne estas ebla, kaŭze de teĥnologijaj procedoj, konigi al la lernantoj ilian funkciadon, eĉ tre supraĵe.

Rilate la enhavon specifan de lerneja agado celanta la lernigon de Esperanto, povus esti utile indiki skeme tri fazojn:

- a. inicadon al skribado kaj elparolado:
- farante komparon kun la itala alfabeto, precizigi la diverssonajn literojn, kaj la funkcion de la supersigno (supersignitaj literoj) – fonetikan kaj grafikan aspektojn oni rimarkas samtempe kun la vortoj klarigitaj de la desegnaĵo kaj precizigitaj de surbendigoj;
 - evidentigi la akcenton sur la antaŭlasta vokalo;
 - ekzerci la lenantojn al legado (ĉiam helpe de desegnaĵoj kaj surbendigoj per kiuj oni povas registri kaj poste reaŭskulti);
- b. minimuma frazo:
- ekrimarki en la lingva mesaĝo la signifajn erojn (diritaĵojn) kaj el ili la “minimuman paron” (havantan esencan signifon) kaj la “pligrandigon” (espansiojn), kiuj precizigas kaj pliriĉigas la signifon;
 - analizi la minimuman paron: oni rimarkas la noman parton (artikolo, nomo, subjekto);
 - la verban parton: verbo (verba kaj noma predikato);
 - analizi la grafisman respondadon (gramatikaj finaĵoj) kun la gramatika funkcio de la vortoj (nomo, adjektivo, adverbo, singularo, pluralo, verbaj tempoj, ktp).
- La metodo devas ĉiam kuŝi sur la komparo de minimumaj frazoj, kunligitaj kun konkretaj spertoj;
- c. pliriĉigo de la minimuma frazo pere de aldono de ekspansioj laŭ gradigita programo kiu ebligas ĉiam pli riĉajn spertojn; progresad- povas esti:
- ekspansioj: dependaj (artikoloj, adjektivoj), sendependaj (adverboj), rektaj (rekta komplemento), nerektaj (nerekta komplemento kunigita per prepozicio);
 - kunordigitaj kaj subordigitaj propozicioj.

La pliriĉigon de la minimuma frazo oni devas konstrui almenaŭ en la komenco, laŭgrade, per logikaj kunligoj de la lingva mesaĝo kun ties rilata grafika esprimmaniero. Komence de baza bildo, oni aldonu aliajn elementojn por plisignifigi la desegnaĵon kaj samtempe pliriĉigi la lingvan mesaĝon pere de ekspansioj, kiuj enŝovas sin en la kunteksto de la parolado kun preciza signifa funkcio. Dum la instruprocedo, oni alfrontu la problemon de la vortfarado pere de la afiksoj, uzante ĉiam grafikan skizon.

Esperanto lerneja eksperimento

Helmut Sonnabend

Pasintjare ĉesis dujara eksperimento de ILEI en ĝia dua regiono, zono Eŭropo-centro okcidenta Eŭropo. Ĝi implicitis demandojn pri diversaj problemoj de la fremdlingva instruado. Interalie la eksperimento prezentas Esperanton kiel alternativon sur la vojo al ĝenerala internacia lingvo.

La raporto nun pretiĝas kaj antaŭvideble aperos en Aŭgusto 1978 kiel libro, eldonota en Pizo. Ĝi traktas jenajn temojn:

Historio de la eksperimento, la lerneja stato de Esperanto en lernejoj, motivado de la eksperimento, internaciaj konferencoj kaj enkonduko de Esperanto en la lernejojn, malhelpoj kaj apogoj de ŝtataj instancoj.

La celoj de la eksperimento; la planado de la eksperimento: lerneja ŝtupo, daŭro de la eksperimento, la lernolibro, la instruplano, instruceloj, la lingva materialo.

La organizado de la eksperimento: landoj, lernejoj, klasoj, gelemantoj, gepatroj, instruistoj, konsilantaro.

La instruado: metodologio, metodoj, didaktiko; skizo de leciono, fraz-strukturoj kaj vorttrezoro, rilatoj inter “nova lingvo” kaj nacia lingvo, kontaktoj inter lernejoj kaj infanoj, la testoj kaj iliaj rezultoj, komparaj rezultoj de anglelernantaj infanoj en 7a kaj 8a lernejoj.

La internacia lernejo: planado, loko, organizado; paragrafaj ĝangaloj, la formiĝo de internacia lernejo, la instruplano: fakoj kaj instruohavo, la interna funkciado de la internacia lernejo, skizo de unu instrua tago kaj ekskursita tago, la sinprezentiĝo de la internacia lernejo, resumo.

La finaj rezultoj de la lerneja eksperimento; la konkludoj.

Por doni konkretan ideon pri la esenco de la libro, mi publikigas ĉapitron el la manuskripto, “La lingva materialo”, kiu priskribas la uzitan leksikonon en rilatoj al la naciaj lingvoj de la infanoj, krome la signifon de la afiksoj, kiuj tabelare demonstras la vastan larĝecon de la leksikono.

LA LINGVA MATERIALO.

La lingva materialo prezentita en dujara eksperimento konsistas el la gramatikaj formoj kiel artikolo, substantivo, kazo, adjektivo, numeralo, pronomo, verbo, adverbo kaj propozicio; kaj tipaj propozicioj kaj oftaj paroltumiĝoj el la sintakso. Sur la sekvantaj listoj [*parto de la libro - hs*] sumiĝas 285 substantivoj, 108 verboj, 51 adjektivoj, 22 adverboj, 4 konjunkcioj, 2 subjunkcioj, 2 interjekcioj, 26 prepozicioj, 20 pronomoj, 31 tabelvortoj kaj 22 afiksoj. Ili estas grandparte kvarlingvaj: esperanta, germana, franca kaj nederlanda. Unuflanke ili montras la amplekson de la eksperimenta materialo, el kiu por la infanoj elformiĝis la bazo de nova lingvo kaj aliflanke ĝi bone demonstros la lemovantaĝojn kiujn entenas Esperanto. Komparante vortspecojn el la eksperimenta vortlisto - substantivoj, verboj, adjektivoj kaj adverboj - kun la samsencaj vortoj el la gepatraj lingvoj de la infanoj, oni facile povas konstati la tre favoran elirpunkton por lerni la lingvon.

La suba tabelo montras en procentoj la kvanton da vortoj jam ekkoneblaj sen aparte lerni ilin.

VORTRILATOJ INTER ESPERANTO KAJ LA NACIAJ LINGVOJ

	germana	franca	nederlanda	meznombre
substantivoj	44,6	62,3	43,5	50,1
verboj	25,9	48,2	20,4	31,5
adjektivoj	37,3	49,0	37,3	41,2
adverboj	36,4	22,7	18,2	25,7
meznombre	36,1	45,6	29,9	37,2

Okulfrapaj estas la pli malvastaj vortrilatoj inter la franca kaj esperanta lingvoj kaj la iom pli granda distanco al la nederlandaj vortesprimoj, tamen la kondiĉoj por ĉiuj infanoj ne estis malbonaj.

Uzonte la saman lingvan materialon kaj transformante ĝin en la francan lingvon ni donus jenan elirpunkton:

el la germana al la franca lingvo		el la nederlanda al la franca lingvo
37,5 %	substantivoj	35,0 %
50,0 %	verboj	56,5 %
35,3 %	adjektivoj	37,3 %
31,8 %	adverboj	31,8 %

Tiuj ĉi tre malmultaj, simplaj komparoj jam demonstros, kial Esperanto helpas lerni alian fremdan lingvon. Tamen estas alia tre interesa aspekto inter la germana kaj nederlanda lingvoj. La interrilatoj inter ambaŭ lingvoj estas tiel malvastaj, ke Esperanto ne nepre estas bezonata ankaŭ ne kiel pontolingvo. La reciprokeco el la prezentita vortmaterialo procentas en:

substantivoj	64,6
verboj	69,4
adjektivoj	72,6
adverboj	50,0
meznombre	64,2

Do, nederlandanoj kaj germanoj povus facile solvi siajn lingvajn problemojn, kondiĉe ke ambaŭ lingvoj estos instruataj en la lernejoj. Tiamaniere la germana lingvo atestus sian respekton al la nederlanda. Sed pro la multeco de la lingvoj tiu ĉi malgranda solvo certe ne sufiĉus.

La leksikono dividita en ĝiaj diversaj vortspecoj jam sufiĉus por la eksperimento formi lingvon donantan la bazon kaj pluevoluigi ĝin. Sed Esperanto demonstros ĝian superan efikecon per siaj afiksoj. Ĉiu afikso havas sian klaran difinon kaj ĝi formas el vortradiko novajn vortojn sen lerni ilin. Tiamaniere multobliĝas la vorttrezoro tiom, ke la lernado de la lingvo jam pro tiu ĉi fakto estas motivigata.

Por doni al ĉiu, kiu studos la antaŭmetitan materialon, la eblecon kontroli la suban tabelon, mi nun klarigos la sencenhavon de la uzitaj afiksoj.

Prefiksoj:

ge-	kunigo de ambaŭ seksoj;
mal-	la kontraŭa senco;
re-	ago denova; returne;

Sufiksoj:

-aĵ	konkreta objekto;
-an	kiu apartenas al;
-ar	kolekto da aĵoj aŭ personoj;
-ebl	kio povas esti farata;
-eg	plifortigas signifon;
-ej	loko;
-em	inklino;
-er	elemento, parteto;
-estr	ĉefo;

-et	plimalfortigas signifon;
-id	por posteulo aŭ naskito;
-ig	fari, kaŭzi ion;
-iĝ	veni en staton;
-il	rimedo, instrumento;
-in	virina sekso de persono aŭ besto;
-ing	objekto, en kiu oni ŝovas ion;
-ist	profesio, daŭra okupado;
-uj	objekto enhavanta; arbo; lando;
-ul	portanto de iu kvalito.

La metodo por formi novajn vortojn estas jena:

<i>amiko</i> →	amik - aĵ - o
	amik - ar - o
	amik - eg - o
	amik - et - o
	amik - ej - o
	amik - in - o
	ge - amik - oĵ
	mal - amik - o
	mal - amik - in - o
	amik - ig - i
	amik - iĝ - i
	amik - em - a
	ge - amik - ig - i
	ge - amik - iĝ - i

En la nun sekvanta tabelo estas listigitaj aldone al la baza vortmaterialo la nombro de novaj vortoj formigitaj per la afiksoj (prefiksoj, sufiksoj). Nur tiaj vortoj estas konsideritaj, kiuj lige kun afiksoj donas sencon por la lingvouzo.

■ ■ ■

La baza vortmaterialo de 573 vortoj elektitaj por la eksperimento kreskas vortfarade al 2840 vortoj, kio signifas pliiĝon al 496%. Kompreneble la tabela superrigardo estas pli teoria ol aplikebla. Sed esence estas demonstrebla la facila komprenebleco de la novaj vortoj, devenantaj el samaj radikoj. Ekkon-ebla estas la fakto de la minimuma lernostreĉo por akiri maksimuman lingvo-scion.

LA BAZA VORTMATERIALO KAJ ĜIA PLIIĜO PER LA AFIKSOJ.

	baza	ge-mal-	re-	-aĵ	-an	-ar	-ebl	eg	-ej	-em	er-estr	et	-id	ig	-iĝ	-il	-in	-ing	-ist	-uj	-ul	sume		
substantivo	285	28	-	2	54	18	140	10	152	104	84	14	21	169	48	75	92	23	28	7	50	21	-	1425
verbo	108	-	29	99	71	-	14	78	37	29	64	7	2	59	-	105	52	66	-	-	32	-	-	852
adjektivo	51	-	30	-	25	-	-	51	24	2	12	-	-	32	-	51	49	-	-	-	-	-	-	25 352
adverbo	22	5	3	-	2	-	-	-	-	1	-	-	-	-	-	9	6	-	-	-	-	-	-	5 53
konjunkcio	4	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	4
subjunkcio	2	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	2
interjekcio	2	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	2
prepozicio	26	-	-	-	4	1	-	7	1	-	4	-	-	-	-	12	12	-	-	-	-	-	-	2 69
pronomo	20	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	28
tabelvorto	31	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	31
afikso	22	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	22
sume	573	33	62	101	164	19	154	146	214	136	164	21	23	260	48	252	211	89	28	7	82	21	-	32 2840

Esperanto ne estu simpligita sed uzata simplamaniere

Albert Lienhardt

Kiam ni havas okazon informi la publikon pri la karakterizaj kvalitoj de la neŭtrala interlingvo Esperanto, ni prave insistas pri ĝia gramatika kaj leksikona simpleco. Ni devus diri, pli ĝuste: ĝia *relativa* simpleco, kompare kun la lingvoj naciaj.

Efektive, fidindaj pedagogiaj eksperimentoj pruvis ke, post nur unujara lernado de Esperanto, la lernantoj povas atingi lingvonivelon same altan kiel post kvarjara aŭ kvinjara lernado — sub kompareblaj lernkondiĉoj — de iu alia fremda lingvo. Tiu fakto devus sufiĉi por konvinki la skeptikulojn, des pli ke la hodiaŭa Esperanto prezentiĝas kiel lingvo alte evoluinta kaj vortriĉa, same kiel la altkulturaj naciaj lingvoj nuntempaj.

Tamen, certaj reformemuloj opinias, ke oni devus igi ankoraŭ pli simpla la fundamentan strukturon de la Zamenhova lingvo. Iuj proponis rezigni pri la plurala finaĵo “-j” ĉe adjektivoj, ekzemple: “Tio estas bela floroj” (anstataŭ “bela floro”). Aliaj proponis rezigni pri la akuzativa finaĵo “-n” ĉe substantivoj kaj adjektivoj, ekzemple: “Li vidis bela floro” (anstataŭ “belan floron”). Ankoraŭ aliaj proponis adopti ambaŭ simpligojn, ekzemple: “Li vidis bela floroj” (anstataŭ “belajn florojn”), kaj tiel plu.

Unuavide, kiam temas pri relative simplaj tekstoj, tiaj proponoj eble povas ŝajni allogaj, precipe por la homoj en kies genta lingvo ne ekzistas plural-finaĵo (ekzemple en la angla) aŭ akuzativ-finaĵo (ekzemple en la angla kaj la franca). Sed kiam oni studas ĝisfunde la konsekvencojn, kiujn rezultigus tiaj gramatikaj simpligoj, oni vole nevole konstatas, ke Esperanto iĝus primitivnivela lingvaĵo, perdinta du valoregajn kvalitojn: maksimuma klareco kaj fleksebleco. Objektiva kaj plenaloraj argumentoj pri tiu temo troviĝas en diversaj seriozaj verkaĵoj tiurilataj, inter aliaj: en la unuarange grava libro *Lingvo kaj vivo* de prof. Gaston Waringhien, kaj ankaŭ en la samaŭtora

artikolo “La lingvo kaj la stilo de Zamenhof”, aperinta en *Heroldo de Esperanto* n-roj 1526-7.

■ ■ ■

Tiom pri la *teorio*. En la *praktiko*, tamen, oni konstatas ke multaj lernantoj kaj malrapide progresantaj kursanoj ofte forgesas la pluralfinajn adjektivojn kaj la akuzativajn finaĵojn, en la skriba kaj precipe en la parola uzo de Esperanto. Por trafe demonstri tiun fakton, jen sekvas imagita dialogo inter du uzantoj de la internacia lingvo, unu malsperta (A) kaj alia bonsperta (B), okaze de hazarda renkontiĝo en zoologia ĝardeno.

- A. Bon'tago', s'io.
- B. Bonan tagon, sinjoro.
- A. Ĉu libera loko, tie?
- B. Jes. Tiuj du seĝoj estas ankoraŭ liberaj.
- A. Bone. Mi laca.
- B. Se vi estas laca, ne ĝenu vin eksidi!
- A. Danko'. — Bela vetero, hodiaŭ.
- B. Efektive. Jam dum la tuta semajno, la vetero estis tre bela.
- A. Mi amas multe varma' suno'.
- B. Ankaŭ *mi* tre ŝatas la sunon, kondiĉe ke ĝi ne estas tro varma.
- A. Kial multaj homoj iras tie', al la granda baseno?
- B. Ili iras tien, por vidi la spektaklon, kiam oni nutros la otariojn.
- A. Nutros... ? La... kio?
- B. La kvar grandajn fokojn, kiujn oni nun baldaŭ manĝigos.
- A. Ĉu ili ne havas manĝi?... Ĉu ili ne faris manĝi?...
- B. Vi certe volis diri: “Ĉu ili ankoraŭ ne manĝis?” aŭ “Ĉu ili ne jam estas manĝintaj?”
- A. Jes. Tio' mi volas diri. — Kiam oni igos manĝi ili'?
- B. Oni igos ilin manĝi (aŭ, se vi preferas: oni igos manĝi ilin) je la dekseca horo, je la kvara horo postmatene.
- A. Mi neniam vidis tio'.
- B. Post kvin minutoj, mi iros al la baseno. Ĉu vi volas iri kun mi?
- A. Ho jes! Mi volas. —
- A. Ŝajnas ke vi estas fremda en ĉi tiu lando, ĉu?
- A. Jes. Fremda. Mi: fremda laboristo.
- B. Kiam vi venis en ĉi tiun urbon?
- A. Mi veni' lasta' monato'.
- B. Ĉu vi ricevas bonan salajron?
- A. Kio' vi volas diri?
- B. Ĉu oni bone pagas vin, por via laboro?

- A. Jes. Mi havas bona' pago'.
- B. Rigardu la otariojn! Ili saltas. Videble, ili estas tre malsataj.
- A. Kio' manĝas tiu' bestoj?
- B. Ili nutras sin per fiŝoj.
- A. ...vivanta' fiŝoj?
- B. Jes, en la naturo. Ĉi tie, oni donas al ili ne vivantajn, sed tute freŝajn.
- A. Venas viro. Li havas sitelo'.
- B. Li estas la otariogardisto, kiu alportas la nutraĵon por la bestoj. Ili bone konas lin.
- A. Oni vidas. Rigardu! Ili venas.
- B. Jes. Ili lerte kaptas la fiŝojn, eĉ el la mano de la gardisto.
- A. Kiom fiŝoj manĝas ili?
- B. Nu, ĉiu el ili ricevas dekon da skombroj (aŭ aliaj) matene, kaj dekon postmatene.
- A. Estas multa. — Kaj... kio estas ti' besto, ki' oni vidas tie?
- B. Tio estas okapio.
- A. Ti'kiel ĝirafo, ĉu ne?
- B. Jes. Ĝi iom similas al ĝirafo kaj al zebro. Besto tre rara, nun.
- A. Kurioza. Tre kurioza. — 'Skultu, s'ioro! Mi havas soifo'. Mi invitas por trinki io'.
- B. Ankaŭ mi soifas, kaj mi volonte trinkos ion.
- A. Kie' povas iri ni?
- B. Ni povas iri tien, en la sen-servistan restoracion, apud la parko. Se vi akceptas, mi proponas al vi ion por manĝeti, eble svedan sandviĉon aŭ ion alian.
- A. Ho jes! Vi vere havas bona' ideo'. Danko'!
- B. Do, ek! Ni iru tuj por ekhavi sidlokon, ĉar, foje, la restoracio estas plena.

■ ■ ■

Tiu nekutima dialogo ebligas fari du konstatojn.

Unue, la primitiva ĵargono de la lingve malsperta "fremdulo" estas iel komparebla al la diversaj dialektoj, ekzistantaj apud ĉiuj naciaj lingvoj. Estas ja konate ke, en ĉiuj evoluantaj landoj, granda plimulto da homoj — eĉ tre kleraj — hejme kaj surstrate parolas iun malaltnivelan lingvaĵon tre malkomplikan, laŭ la konata *principo pri inercio*, t.e. *per plej eble malgranda klopodo*. Sed kiam ili uzas sian lingvon por skribi, tiuj samaj homoj klopodas uzi laŭeble senerare kaj bonstile la komunan nacian lingvon. Konstateble, la naciaj lingvoj kaj ties dialektoj *apudekzistas* en diversaj vivosferoj, sed ili estas uzataj paralele, foje eĉ samtempe.

36 *Due*, la sama fenomeno estas konstatebla ankaŭ en Esperanto: la primit-

iva ĵargono de niaj lingve mallertaj novuloj estas kvazaŭ *dialekto*, uzata dum kunvenoj kaj kongresoj apud la oficiala lingvo laŭfundamenta. Sendube, ĝi ofte povas sufiĉi por ebligi reciprokan komprenon en tre simplaj konversacioj, eĉ se iuj gramatikaj misaĵoj "ŝiras la orelojn" de la spertaj Esperanto-lingvuloj.

Post tiuj konstatoj, stariĝas la jena demando: ĉu, por kontentigi la reformemulojn ĉi supre menciitajn, oni eble devus lernigi al ĉiuj komencantoj (precipe al la ne-tre-kleraĵoj) tiun simplegan Esperanto-dialekton, lasante al la intelektuloj kaj intelektemuloj la plezuron ellerni puran, altnivele literaturan Esperanton? *La respondo pri tiu demando povas esti nur nea*, pro la tri jenaj kialoj:

1. En la komenco, preskaŭ ĉiuj niaj lernantoj ja pli malpli "ĵargonas"; do, ili senkonscie uzas kvazaŭ iun Esperanto-dialekton kiam ili provas paroleti per tiu lingvo ankoraŭ grandparte fremda por ili.
2. Tiu dialekteca lingvaĵo estas malpli uzata, kiam la lernantoj diligente plulernas nian lingvon, sekvante superajn Esperanto-kursojn kaj legante celservan didaktikan Esperanto-literaturon (ekzemple la *Fundamentan Krestomation* kaj facilajn legolibrojn). La situacio estas komparebla kun tiu de la infanoj ĉiulandaj, kiuj, en la lernejo, iom post iom lernas regisian nacian lingvon, eĉ se hejme kaj surstrate ili babilas dialekte.
3. Necesas forte emfazi kaj ĉiam ripeti, ke la celo de la interlingvo Esperanto estas: servi kiel *plenvalora* internacia perilo en *ĉiuj fakoj* kaj sur *ĉiuj niveloj* de la homa aktiveco, do ne nur kiel vulgara helpilo por povi babili pri ordinaraj ĉiutagaĵoj, sed ankaŭ kiel universala esprimilo intelekta. Tial, ĝi devas resti *maksimume klara* kaj *maksimume fleksebla*, dank' al la pluralo de adjektivoj kaj la akuzativa finaĵo "-n". Voli sen-konsidere simpligi ĝian gramatikan strukturon signifus, en realeco, mise *kripligi* ĝin; tio estus misfaro nepre kontraŭcela, do absolute maldezirenda.

■ ■ ■

Tamen, la natura sopiro al pli granda simpleco de nia lingvo, kiun ofte esprimas multaj lernantoj, estas plenprava kaj postulas la tutan atenton de ĉiuj Esperanto-pedagogoj. Fakte: tio, pri kio temas, ne estas *pli granda simpleco de la lingvo*, sed *pli simpla lingvouzo*. Tiu deziro de novuloj estas kontentige plenumbla tiam, kiam, en unuagrada Esperantokursoj, oni lernigas *nur la plej ofte bezonatajn* radikvortojn, gramatikajn finaĵojn, sufiksojn, prepoziciojn kaj la du pleje bezonatajn participojn "-ant" kaj "-it". (Vidu, ekzemple, la vojmontran lernolibreton por franculoj *Manuel d'initiation* de Bernard Thaillet.) Sed, unuavice, estas necese lernigi al la kursanoj *simplajn frazomodelojn por ordinaraj konversacioj*. Ni ĉiam estu konsciaj: homoj, kiuj lernas fremdan lingvon deziras baldaŭ povi *paroli* ĝin. Do lernantoj, kiuj baldaŭ kapablas iomete paroli per Esperanto, pli multe emas plulerni, ĝis

plena posedo de ĉiuj gramatikaj reguloj kaj de la dezirata vortprovizo.

Ni neniam forgesu: Esperanto volas esti – kaj estas! – *lingvo vivanta*, t.e. lingvo *parolebla* kaj tutmonde *parolata*. Ju pli rapide niaj lernantoj kapablas *paroli* ĝin (eĉ nur tre primitive), des pli multe fortiĝas ilia entuziasmo, ilia plulernemo kaj ankaŭ ilia kunlaboremo en nia movado. Sed, por tio, oni devas ripeti laŭeble ofte: verkante, skribante kaj parolante, ni ĉiam uzu lingvostilon maksimume simplan, laŭ la saĝa rekomendo de d-ro Zamenhof: “Ni venkos nur, se ni zorgeme konservos al nia lingvo ĝian simplecon kaj facilecon”.

La Cseh-metodo malmoderniĝis

W. Krikke

Iam estis homo, kiu deziris instrui Esperanton al grupo da diverslingvaj personoj. Vole nevole li devis klarigi esperantovortojn per aliaj esperantovortoj, per gestoj, movoj kaj objektoj. Fakte, li instruis Esperanton kiel ni instruas la nacian lingvon al niaj etuloj du-trijaraj. Sed li vidis, ke Esperanto estas pli taŭga por tia “rekta” instruado ol la naciaj lingvoj. Li ellaboris tutan, tre logikan metodon. Li ankaŭ spertis kaj klare ekkonsciis, ke sprita traktado de la Esperanto-gramatiko havas grandan valoron, estas preskaŭ esenca kontribuo al ĉiu bona rekta metodo.

Tiu homo estis Andreo Cseh kaj li fariĝis sukcesa pioniro de tiu interesa metodo. Li kaj liaj imitantoj instruis Esperanton en multaj eŭropaj landoj en miloj da kursoj kun ofte granda sukceso. Tio okazis inter la du mondmilitoj.

Tamen, jam tiam oni konstatis, ke multaj “abiturientoj” de la kursoj ne longe daŭrigis la studadon kaj ne fariĝis esperantistoj.

Post la dua mondmilito la Cseh-kursoj ne plu estas ĝeneralaj kaj malofte vere sukcesaj. Nur en la lastaj jaroj kelkaj esperantistoj klopodas enblovi novan vivon en tiaspecan instruadon, ĝis nun kun malmulte da sukceso.

Ĉu ili pravas, jes aŭ ne? Mi opinias ke ne.

Dum multaj jaroj mi sekvis atente la evoluadon de la rekta instruado, ne nur rilate Esperanton, sed ankaŭ rilate aliajn lingvojn. Ne mirige cetere ĉar mi, kiel juna instruisto, fariĝis esperantisto en 1930a, pere de skriba kurso, kaj en mia instrukariero mi ĉefe okupiĝis pri fremdlingva instruado dum tridek jaroj. Ankoraŭ nun, kiel pensiulo, mi regule instruas Esperanton, kaj ankaŭ verkis skriban kurson, kiu instruas plej rapide legi Esperanton.

Same kiel Cseh mi spektis, ke bonhumoro kaj sprito estas grandvaloraj en la instruado. Oni uzu ĉiujn eblecojn por agrablighi la instruhorojn.

Sed nun mi alproksimiĝas al tikla punkto numero unu.

La nunaj homoj alie reagis al spritaĵoj ol tiuj el la tridekaj jaroj de nia jarcento. Tiam estis relative facile ridigi la lernantojn pere de simplaj spritaĵoj.

Bibliografio.

A. Lienhardt, “Grava bezono: didaktika Esperanto-literaturo laŭeble simpla kaj facile komprenebla”, *Esperanto*, n-ro 764.

A. Lienhardt, “Pledo por Esperanto laŭeble simpla kaj facile komprenebla”, *Heroldo de Esperanto*, n-ro 1478.

A. Lienhardt, “Pri la kompleksaj vortoj en Esperanto”, *Scienca Revuo*, n-ro 114/115, oktobro 1975.

A. Lienhardt, “Modela prononco de la interlingvo Esperanto”, *Scienca Revuo*, n-ro 100/101, majo 1973. Ankaŭ represita kiel aparta broŝuro.

A. Lienhardt, “Klariga antaŭparolo”, en *Amuzaj dialogoj en Esperanto*, Roterdamo: UEA, 1973, pp. 5-9.

Hodiaŭ ni ĉiuj estas pli malpli trosatigitaj per spritaĵoj de la plej bonaj humoristoj, kiujn ni ĉiutage aŭdas kaj vidas sur la televida ekrano.

Ankaŭ libroj kun spritaĵoj kaj spritaj desegnaĵoj nun abundas, kontraŭe al la situacio ĉirkaŭ 1930a.

Tial la homoj ne plu entuziasme kuras al Cseh-metodaj kursoj, malgraŭ bonaj instruistoj, ĉar estas superhoma tasko esti samtempe bonega esperantisto, bonega lingvo-instruisto, bonega humoristo kaj vigla, stimulanta personeco.

La dua tikla punkto estas esenca manko de la Cseh-metodo, nome la neuzo de la nacia lingvo kiel helpilo. Kompreneble, se instruisto kaj lernanto ne scias la lingvon unu de la alia, oni nur povas uzi la ekskluzive rektan metodon. Sed tiaj situacioj estas esceptoj.

Bonvolu nun pensi ekzakte kaj sen antaŭjuĝo!

Instruisto de fremda lingvo devas konstante klarigi vortojn kaj esprimojn al siaj lernantoj. Se li uzas la rektan metodon ekskluzive, li povas montri, kio estas marŝi, salti, ridi, kajero, tablo, floro ktp. Pli malfacile jam estas klarigi la signifon de kuraĝa, fidela, amo, malamo, malico kaj timo. Preskaŭ neeble estas klarigi rekte, sen bildoj, la nomojn de plantoj kaj bestoj, malsanoj, iloj kaj instrumentoj. Legante la bonajn difinojn en Plena Ilustrita Vortaro oni tamen kelkfoje ankoraŭ dubas. Tamen la nura mencio de la samsignifa nacia vorto tuj solvas la problemon. Tial estas sensenca malŝparo de tempo ne uzi la konatan gepatran lingvon de la lernantoj por klarigi malfacilaĵojn. Kompreneble oni uzu la instruatan fremdlingvon kiel eble plej multe. Oni abomenu "krokodiladon".

La tria malforta punkto de la Cseh-metodo estas la neuzado de lernolibroj. "La lernantoj mem eltrovu la regulojn kaj konstruu sian gramatikon". Similajn sloganojn oni ankaŭ aŭdas pri naciaj lingvoj kaj pri matematiko. Sed estas reago kontraŭ dikaj, tedaj gramatikoj. Sed kial, pro la ĉielo, la modestaj lernantoj denove eltrovu kaj formulu kion aliaj, multe pli spertaj kaj kleraj ol ili, jam klare difinis? Ĉu instruante teĥnikon oni eble ankaŭ postulas inventitaĵojn? Estus ja freneze.

Bona lernolibro povas sendube esti grava, eĉ nemankipova helpilo en la instruado, ankaŭ jam tuj en la komenco.

Konklude ni povas diri, ke bona instrumentado por Esperanto estu kombino de ĉiuj metodoj. Oni parolu, deklamu, eĉ oni montru objektojn, bildojn ktp., oni kantu kaj ridu sed oni ne timu klarigi gramatikaĵojn, oni postulu encerbigradon de vortoj, oni donu traduktaskojn kaj severe korektu ilin, koncize dirite, oni uzu la instruatan lingvon por ĉiuj celoj por kiuj lingvo povas esti uzata.

Jen la plej sekura vojo al daŭra sukceso.

Protokoloj el Tananarivo

PROTOKOLOJ de la kunsidoj de ILEI-estraro en Tananarivo (Malagasa Demokrata Respubliko) de la 1978.03.25 ĝis la 1978.04.01.

Tananarivo, la 1978.03.25an, je la 18a horo kunvenis la estraro de ILEI ĉe Institut National Supérieur de Formation et de Recherche Pédagogiques, Complexe Scolaire d'Ampéfilna. Ĉeestis: rektoro Helmut Sonnabend, prezidanto; d-ro prof-ro Mario Dazzini, ĝenerala sekretario; Eugène Raveloson, sekciestro de ILEI en Malagasio; A. Rakotondravao, kasisto de la ILEI-sekcio en Malagasio; ĉeestis kiel gastoj: d-rino prof-ino Katina Dazzini; direktorino Karin Ruff.

Aŭskultante la informojn de la sekciestro de la Malagasa ILEI-sekcio s-ro Eugene Raveloson pri la historia evoluo de Esperanto en la lando kaj pri la nuntempa stato, la estraro de ILEI konstatis ke la kondiĉoj eklabori en la instruista kampo estas pozitivaj, ĉar ankaŭ la ŝtato oficiale rekonis la novan sekcion laŭ la dokumento n-ro 48/P/AT/TANA de la 1978.03.10 (Chef du Service Provinciale de l'Administration Territoriale), konforme al la dekreto n-ro 60.133 paragrafo 5 de la 1960.10.03.

Kombine kun tiu-ĉi ŝtata rekono, la estraro sugestis al la malagasa ILEI-sekcio entrepreni novajn paŝojn por

revigligi la stagnantajn esperantajn organizojn en la lando, kiel ekzemple:

- Malagasa Instituto de Esperanto (fondita en la jaro 1968a kaj rekonita de la ŝtato; ties prezidanto estas d-ro Ratefiarison);
- Asocio de Katolikaj Esperantistoj de Madagaskaro (fondita la 23an de decembro 1961a, aliĝinta al IKUE), kaj fondi Esperanto-Asocion de Malagasio, kiu aliĝu al UEA. Kunlige kun tiu ĉi lasta punkto, la prezidanto informis pri la preteco de UEA ne fari problemojn pri kotizoj, se la Esperanto-Asocio de Malagasio ne povos transpagi (laŭ informo de d-ro Korseti).

Dua kunsido.

La kunsido okazis la 1978.03.26an je la 14,45 en la sama ejo. Krom la personoj cititaj en la unua kunsido, ĉeestis s-ro Désiré Rabevazaha, prezidanto de Junulara Esperantista Organizo de Madagaskaro, landa sekcio de TEJO.

S-ro Raveloson informis la estraron pri la nuna stato de la ILEI-sekcio en Malagasio kaj diris ke li, pro diversaj kriterioj, ne intencas nombre grandigi la sekcion, ĉar nun devas esti faritaj pluraj bazaj preparlaboroj. La laboro inkluzivas konstantan informadon de la instruistaro. Jam ankaŭ la sekcio atentigis la instruistan sindikaton pri la fondo de la

sekcio. Jam montriĝas, ke la diskutado kun gepatroj pri enkonduko de esperanto en la lernejojn estas malfacila, ĉar ili, kvankam estas trafikaj argumentoj, ne vidas la praktikan valoron de Esperanto. La gelnantoj estas sub la influo de la klasinstruistoj, kiuj konsilas al ili ne perdi tempon por lerni la lingvon.

Estas jam kelkaj kunlaboraspektoj kun la Unesko-komisiono: la sekcio petis la moralan kaj praktikan apogon fare de la komisiono.

La stato de lernolibro por infanoj, laŭ informo de s-ro Raveloson (la verkisto de la lernolibro) laŭ enhavo, estas manuskripte preta, sed ĝi devas esti nun retajpita kaj tralaborita.

La estraro interkonsentis, ke s-ro Raveloson sendos la tralaboritan manuskripton al la prezidanto de ILEI, kiu siaflanke transdonos ĝin al la esplora centro de ILEI en Budapeŝto, petante juĝi la lernolibron laŭ lingva, lingvistika kaj metodika vidpunktoj.

En la sekvo, oni konsideros ĉiujn eblajn vojojn por realigi la presigon. Rilate vortareton por malagasaj infanoj, estas rekomendinde verki ĝin en malagasa-esperanto kaj inverse.

Laŭ letero de UEA de la 1978.02.17a, subskribita de d-ro Korseti, UEA pretas helpi la malagasan ILEI-sekcion per presado de lernolibroj kaj vortaro.

14a Internacia Konferenco de ILEI en Malagasio.

La partoprenantoj la kunsidon esploris la kondiĉojn por organizi la 14an Konferencon de ILEI. La estraro deziras ankaŭ la partoprenon de instruistoj el landoj najbaraj al Malagasio. Al la demando, ĉu eblos konferenci, loĝi aŭ restadi en la sama domo, s-ro Raveloson respondas ke principe eblas.

La estraro decidis viziti Hilton-hotelon por ekscii ĉu eblos konferenci en la hotelo je favoraj prezoj. La ejo plenumas ĉiujn kondiĉojn ankaŭ rilate al la vintraj temperaturoj. La konferenco okazos en la kutima kadro sed ĉefe laŭ

indikoj de la malagasa ILEI-sekcio, tio estas ĉiuj prelegoj enhavos temojn pri edukado, kulturo kaj scienco de la afrikaj landoj. Enplanitaj estas vojaĝoj en Malagasio kaj en Afriko.

Pro tio la estraro decidis proponi ke la tuta restado daŭru kvar semajnojn, por uzi la altajn flugkostojn. La konferenco daŭru dum unu semajno kaj la tempo por studvojaĝoj dum tri semajno. La antaŭvidita tempo estos inter la 17a de julio kaj la 27a de aŭgusto 1980a.

La malagasa ILEI-sekcio klopodas ricevi sentebajn rabatojn dum la konferenco. Ankaŭ estas proponoj flanke de la estraro ricevi rabaton por la flugado al la kontinento.

La estraro de ILEI proponis al la prezidanto de la Malagasa sekcio de TEJO, s-ro Rabevazaha, komune konferenci kun ILEI en la sama tempo en Tananarivo.

Tria kunsido.

La kunsido okazis la 1978.03.28an, je la 16a horo. Krom la personoj cititaj en la unua kunsido, ĉeestis s-ro Désiré Rabevazaha, prezidanto de Junulara Esperantista Organizo de Madagaskaro (JEOM); s-ro Roger Rasolofo, kasisto de JEOM; s-ro Honorice Randrianantoandro Lalao, sekciestro de JEOM en Manakara.

Centro en Afriko – Fondita estas nova Centro en Afriko, kies nomo estas jena: Zono Afriko - Centro Sudorienta Afriko. La gvidanto de la Centro estas s-ro Eugène Raveloson.

Deziroj de la sekciestro; kotizoj – La nova sekcio ankoraŭ ne havas apartajn dezirojn. Nur estas peto al ILEI helpi la sekciestron por partopreni la antaŭviditan konferencon en Pollando. Pri la kotizoj oni interkonsentis, ke la sekcio rekte ĝiros la monon al la kasisto de ILEI. Por IPR estas la regulo principe pagi la kajorojn kaj teni la sumojn en la kazo de la sekcio ĝis estos la ILEI-konferenco en Antananarivo.

Vizito al AIR-Madagaskar okazis la 1978.03.28an je la 10a horo, kun

renĉevuo kun Inspektoro Serge Rakotomalala. La estraro, s-ro Raveloson, s-ro Rakotondravao kaj la ceteraj membroj vizitis la flugkompanion por informiĝi pri la kondiĉoj de la aviadila vojaĝo. Temas ĉefe pri la ebleco atingi de diversaj urboj, ekster Afriko, Tananarivon. Jam nun estas konstateble ke ĉiuj partoprenantoj ricevos flugrabaton de 65 procentoj ek de Parizo aŭ Romo. Por atingi Romon aŭ Parizon la kompanio intencas interkonsenti kun aliaj flugkompanioj, ek de ĉiu koncerna flughaveno, rabaton de 25 procentoj. Pri la antaŭvidita prezo la estraro estos informita en maksimume kvar semajnoj. La laŭmoda prezo enhavos la tutan restadon, tio estas flugado plus restado en Hotelo Hilton. Jam nun montriĝas ke la prezoj estas tre favoraj rilate al jam nun konataj kondiĉoj fare de diversaj vojaĝ-entreprenoj.

La 1978.03.29an posttagmeze estis vizitata la *Zamenhof-strato*, kiu estis nomita antaŭ kelkaj jaroj.

Je la 17a horo de la sama tago okazis *vizito en la redakcio de "Madagaskar Matin"*. La grupo kontaktis tie la redaktoron, s-ron Arsène Ralaimongo, kiu informiĝis pri la vizito de la internacia delegacio, pri kio li raportis la sekvantan tagon en la gazeto, aldonante foton de la delegacio dum la vizito al la redakcio.

La 1978.03.30an matene, la delegacio vizitis la *sidejon de la Malagasa sekcio de TEJO*, laŭ invito de s-ro Rabevazaha. La akcepto estis tre afabla kaj estis vigla konversacio pri diversaj temoj de la lando mem; la delegacio aparte interesiĝis pri la literaturo de la lando. La ĉeestantaj membroj de JEOM kantis kelkajn popolkantojn. La ĝenerala sekretario sugestis al ili sendi al li la muziknotojn de diversaj popolkantoj por fari la muzikaranĝon perspektive post traduko de la teksto. Tio povos servi en kultura prezentiĝo dum la konferenco en la 1980a.

Dum la sama tago, je la 14,30 okazis *vizito en Hilton-hotelo*. Tie la delegacio

informiĝis pri loĝado, konferencaj ĉambroj kaj salono por la inaŭguro de la planita konferenco en la jaro 1980a. Provizore estis notita la dato de 18a de julio ĝis 29a de julio 1980a. La ĝenerala impresio estis, ke la Hilton-hotelo plenumos perfekte ĉiujn kondiĉojn por la konferenco.

Gazetara konferenco – Posttagmeze je la 17a horo, la redaktoro de la ĉefa gazeto de Tananarivo intervjuis la estraron, tio estas la ĝenerala sekretario kaj la prezidanto. Interpretis la estro de la ILEI-sekcio s-ro Raveloson.

La ĵurnalisto demandis kaj informiĝis pri la strukturo kaj signifo de Esperanto. Interesis al li ankaŭ la nuna stato de Esperanto en la mondo; pere de dokumentoj d-ro Dazzini montris, ke jam nun pli ol 100 francaj deputitoj faris leĝproponon pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn; krome li prezentis dokumenton de Unesko en kiu klare estas rekonita la valoro de Esperanto por la disvastiĝo de edukado, kulturo kaj scienco.

La redaktoro same akceptis la ideon konsideri la malfermon de lingva anguleto pri instruado de Esperanto en la gazeto.

La 1978.03.31an matene okazis *vizito de Zoma*. Antaŭtagmeze la delegacio vizitis la faman foiron de la urbo, nomata Zoma. La tre vigla foiro donis kompletan superrigardon pri multaj merkataĵoj, inter diversaj legomoj, fruktoj. Floroj estis troveblaj metiaĵoj kaj broditaj tolaĵoj. La tuta urbo estis totala foiro: en ĉiuj stratoj kolektiĝis la vendistoj kaj por marŝandaj prezoj oni povis akiri diversajn varojn.

Dum la sama tago, posttagmeze okazis *akcepto ĉe la Ministerio pri dua-grada edukado*. Akceptis la delegacion la ĝenerala sekretario de la Ministro, s-ro Rajaoson François, kiu anstataŭis la ministrinon. Al li la delegacio prezentis siajn dezirojn:

– esplori la eblecojn en elementa lernejo por permesi la instruadon de

12a Internacia ILEI-Konferenco Gorizia-Italujo

- Esperanto en eksperimenta kadro inter Malagasio kaj Germana Federacia Respubliko;
- respondi al instruprojekto pri enkonduko de Esperanto en Malagasajn lernejojn, fare de s-ro Raveloson;
 - atentigi la lernejojn, flanke de la Ministerio, pri la partopreno de la mondekspozicio de infandeseĝnaĵoj en Parizo;
 - apogi finance kaj morale, pere de la Ministerio, la eldonon de Esperantolernolibro por malagasaj lernejoj;
 - sendi ŝtatan reprezentanton kaj scienciston dum 1979a al Universitato Sorbonne por partopreni simpozion pri lingvaj solveblecoj en la mondo;
 - konsideri la partoprenon de Malagasaj infanoj en internacia lernejo en Parizo samtempe kun la simpozio kaj ekspozicio;
 - doni la ŝtatan permeson al la planita internacia ILEI-konferenco dum la jaro 1980a;
 - akcepti la honoran prezidantecon de la kongreso kies temo estos "Esperanto por internacia edukado en Afriko";
 - disponigi helpon al la kongreso en la formo de senpaga uzado de konferencaj ĉambroj kaj granda salono por la inaŭguro, kiel same aŭtobusojn por ekskursaj studceloj;
 - rekomendi lokojn kaj regionojn por studvojaĝoj.
- La ĝenerala sekretario montris la intencon transdoni siajn dezirojn al la koncerna ministro, esprimante sian deziron ricevi de ni pli ampleksajn informojn pri niaj intencoj kaj agadoj.
- Vana vizito al la ŝtata radiostacio* - la delegacio provis saluti kaj prezenti sin al la direktoro, kiu ne volis akcepti ĝin.
- La 1978.04.01an okazis *vizito al la Ĉefministro* - Je la 11a horo akceptis la

delegacion la ĉefministro de Malagasio, s-ro Rakotoarijaona Désiré. Je la komenco de la akcepto, la prezidanto de ILEI prezentis la membrojn de la delegacio kaj koncize parolis pri la organiza strukturo de ILEI, kaj nomis la landojn kiuj estas sekcijaj membroj de ILEI.

Li informis pri la celo de la vizito, kaj s-ro Raveloson raportis en la malagasa lingvo pri la vizito ĉe la ministro de edukado. La Ministro-Prezidanto ricevis kopion de letero al la Ministro pri Edukado. La prezidanto de ILEI formulis du demandojn al la ĉefministro:

1. Ĉu la ŝtato donos aprobon organizi ILEI-kongreson dum 1980a?
2. Ĉu la Ministro-Prezidanto estos preta akcepti la altan patronecon?

La ĉefministro respondis, ke nia vizito estas por li kaj lia ŝtato granda honoro, ĉar ni venis al li el foraj landoj kaj principe ne kontraŭas al niaj petoj, tamen petas skribi tiurilate leteron, ĉar la koncerna Ministerio devos pritrakti ilin.

Same estus la okazo de la kongreso granda honoro por la popolo de Malagasio, kaj emfazis la grandan gastamon de ĝi.

En la nomo de la prezidanto de UEA, d-ro Tonkin, la prezidanto de ILEI informis la ĉefministron apogi UEAn en la deziro enŝovi Esperanton en la tagordon de Unesko-sembleo.

La ĉefministro petis leteron de la Prezidanto de UEA por konsideri la aferon.

Je la fino de la akcepto la ĉefministro ricevis de la sekretario d-ro Dazzini la Biblion en Esperanta traduko de d-ro Zamenhof, kaj de rektoro Sonnabend la bildvolumon pri urbo Peine, kaj li diris, ke la du filoj, kiuj lernas la germanan lingvon, provos profiti el ĝi.

La vizito daŭris 35 minutojn.

★

Danke al la Esperanto-Grupo de Gorizia kaj precipe al koleginino Maria Di Maso, la 12a Internacia Konferenco de ILEI okazos, ĉe

PALACE HOTEL

corso Italia 63 - I-34170 Gorizia, Italujo

tel.: 0481-82166 aŭ 0481-82167 - internacia *39481-

de la 19a ĝis la 27a de aŭgusto 1978.

Kiel kutime, ĉiuj partoprenantoj loĝos, manĝos kaj laboros en la sama ejo, t.e. granda, moderna hotelo; ĉiuj ĉambroj estas komfortaj kaj enhavas proprajn servojn.

La kosto *po persono* por la restado, de la tranokto de la 19a ĝis la tagmanĝo de la 27a (8 tagoj) estos:

1. por kompleta pensio, kun kvarona litro da vino aŭ minerala akvo en unulita ĉambro 21.000 lirojn potage en dulita ĉambro 19.500 lirojn potage en tri aŭ kvarlita ĉambro 18.500 lirojn potage
2. por duonpensio (tranokto, maten- kaj tag-manĝo) kun kvarona litro da vino aŭ minerala akvo: en unulita ĉambro 16.500 lirojn potage en dulita ĉambro 15.000 lirojn potage en tri aŭ kavrlita ĉambro 13.500 lirojn potage

Konsiderante, ke la nombro de la unulitaj ĉambroj estas limigita, bonvolu serĉi kundormant(in)on, kaj mendi kune dulitan ĉambron.

Por aliĝi bonvolu skribi al:

s-ino Maria Di Maso, via Michel Staedter 11

I-34170 Gorizia, Italujo

tel. (escepte de julio) 0481-81136 - internacia *39481-.

sendante samtempe la monon al:

Maria Di Maso nata Zuppetta
poŝtĝirkonto 24 / 4372 Gorizia, Italujo

La organiza komitato akceptos la aliĝojn ĝis maksimume la 31an de julio 1978a. Ne prokrastu la sendon de la kotizo por la partopreno, ĉar vi riskus ne ricevi rezervitan ĉambro en Palace Hotel. Kompreneble oni povos aliĝi al la konferenco ankaŭ post la 31a de julio, sed la komitato ne garantias la rezervigon de la ĉambro.

ATENTU: se la telefon-numero 0481-81136 ne respondos, telefonu al 0481-89304. Dum julio, sendu la korespondaĵojn al "Associazione Esperantista Goriziana, presso Pro-Loco, borgo Castello, I-34170 Gorizia, Italujo".

PROVIZORA PROGRAMO.

1978.08.19a.

- Alveno de la konferencanoj.
- vespere ILEI-estraro salutas la partoprenantojn (subtera salono en Palace Hotel).

1978.08.20a.

- matene Inaŭguro de la konferenco.
Festparolado: "La humanisma koncepto de d-ro Zamenhof".
- posttagm. Enkonduko en la temaron:
 - 1 — Fakaj vidpunktoj en la lerneja instruado: lingvo, matematiko, geografio, historio, fiziko, ĥemio, biologio, laboro, ekonomio, dommastrumado, teĥniko, muziko, arto (H. Sonnabend).
 - 2 — La pedagogia-didaktika problemaro de la Internacia Lingvo. La dua fazo de la lerneja eksperimento en Malsuprasakcio (I. Szerdahelyi, H. Sonnabend).
 - 3 — Pluperfektiga metodologia kurso (I. Szerdahelyi).
- Ĝenerala diskutado kaj fiksado de la laborpunktoj.
 - 1 — Laborgrupoj kaj elekto de la gvidantoj:
 - a. lingvo ĝenerale — fremdaj lingvoj;
 - b. matematiko;
 - c. faka kampo: historia — socia (historio, geografio, socio);
 - ĉ. faka kampo: natursciencoj (fiziko, ĥemio, biologio);
 - d. faka kampo: laboro — ekonomio — teĥniko — dommastrumado;
 - e. faka kampo: muzeca — kultura edukado.
 - 2 — Eklaborado de la grupoj.
 - 3 — Pluperfektiga metodologia kurso.

1978.08.21a.

- matene La pedagogia-didaktika problemaro de la Internacia Lingvo — prelego de prof-ro I. Szerdahelyi.
- La dua fazo de la lerneja eksperimento en Malsuprasakcio — aldona prelego de H. Sonnabend.
- Rezulto kaj diskutado pri la interlingvistika kongreso en Budapeŝto.
- posttagm. Fakaj laborgrupoj.
- Metodologia kurso.

1978.08.22a.

- matene Rezulto kaj spertoj el du lernejaj eksperimentoj: regionoj I kaj II (I. Szerdahelyi, H. Sonnabend).
- Perspektivoj en regiono III (L. Thune).
- Diskutado.
- Konferenca kunsido. 1979: lingva simpozio en Parizo (La Sorbonne), mondekspozicio de infandeseĝnaĵoj (halo de Unesko), internacia lernejo.
- posttagm. Fakaj laborgrupoj.
- Metodologia kurso.

1978.08.23a.

- matene Rezultoj kaj spertoj el diversaj lernejaj eksperimentoj (prelegoj de diversaj kolegoj).
- Rezultoj kaj spertoj el la Paderborna lerneja eksperimento.
- posttagm. Fakaj laborgrupoj.
- Metodologia kurso.

1978.08.24a.

- Tuttaga ekskurso.

1978.08.25a.

- matene Komitatkunsido:
 - a — raportoj de la sekcioj;
 - b — nova organiza strukturo de ILEI;
 - c — novaj interkonsentoj pri kunlaboro kun aliaj organizoj;
 - ĉ — demandoj al la estraro;
 - d — konferenclokoj en 1979, 1980, 1981;
 - e — vizito al Tananarivo (Madagaskaro) — Dazzini-Sonnabend;
 - f — raporto de la ILEI-prezidanto;
 - g — raporto de la ILEI-vicprezidanto;
 - ĝ — raporto de la ILEI-sekretario;

- h – raporto de la ILEI-vicsekretario;
 ĥ – raporto de la ILEI-kasisto;
 i – Internacia Pedagogia Revuo.
 posttagm. Fakaj laborgrupoj.
 – Metodologia kurso.

1978.08.26a.

- matene Resumadoj:
 a – raportoj de la fakaj laborgrupoj;
 b – la pedagogia, didaktika problemaro;
 c – la stato de la lernejoj eksperimentoj;
 ĉ – la nuna stato de ILEI;
 d – propono kaj aprobo de la fina rezolucio.
 posttagm. Ebleco partopreni la ILEI-ekzamenon (pedagogia parto kaj lingva parto).
 vespere Adiaŭa vespero.

1978.08.27a.

- Forveturo de la konferencanoj.

Rimarko – Gorizia situas norde ĉe la landlimo inter Italujo kaj Jugoslavujo. Ĝi estas facile atingebla trajne kaj aŭtomobile el Aŭstrujo kaj Jugoslavujo. Ne ĉiuj trajnoj veturas rekte al Gorizia, kaj kelkfoje oni devas trafi koneksan trajnon en Monfalcone.

Mortis Ludwig Pickel.

La 7an de majo mortis, en Nürnberg, eldonisto Ludwig Pickel. Lia malapero aparte trafas ILEIn, ĉar inter liaj sennombraj iniciatoj en la eldona fako, li estis la unua eldonisto de la nova serio de "Internacia Pedagogia Revuo" en ĝiaj unuaj, kaj plej malfacilaj, stariĝjaroj. Lia nekomperebla viglo kaj agemo ne baldaŭ estos forgesata.

Estraro de ILEI

- prezidanto: rektoro Helmut Sonnabend, In der Horstwiesen 42, D-315 Peine, Fed. Resp. Germanujo.
 vicprezidanto: direktoro Johano Ingusz, Liget út.40, H-1102 Budapeŝto X, Hungarujo.
 sekretario: d-ro Mario Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa, Italujo.
 vicsekretario: Gaston Turin, 43 rue E. Magnin, F-25300 Pontarlier, Francujo.
 kasisto: Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund, Svedujo.

Sekciestroj de la Ligo

- Aŭstralujo: prof. Ivan Th. Maddern, Box 411, Morwell, Victoria 3840.
 Aŭstrujo: Ernst Rixner, Kleingasse 6, 18/8/13, A-1030 Vieno.
 Belujo: Germaine Pirlot, Kemmelbergerstraat 3-5/b, B-8400 Oostende.
 Brazilo: Elvira Fontes, C.P. 5888, São Paulo.
 Britujo: Hilary Chapman, 7 fairacre road, Barwell, Leicester LE9 8HH.
 Bulgarujo: Vasil Bozarov, ul. Ljubotran 98, blok 4, Vhod A, Sofia.
 Danujo: Lis Thune, Brembävänget 15, DK-2650 Hvidovre.
 Finnujo: Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.
 Francujo: Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.
 F.R.Germanujo: d-ro Hermann Behrmann, Grunigerstr. 5, D-4790 Paderborn.
 Grekujo: Sokrates Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Ateno (816).
 Hispanujo: prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Colegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante.
 Hungarujo: Zsuzsa Bacsay, PF 139, H-1368 Budapeŝto.
 Islando: Baldur Ragnarsson, sogavegur 170, Reykjavík.
 Israelo: Reuven Alberg, str. Kraus 12, Tel-Aviv, Ramat Aviv.
 Italujo: d-ro Catina G. Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa – pĉk. 22/2883.
 Japanujo: Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343.
 Jugoslavujo: d-ro Miodrag Stojanoviĉ, Duruntorska ul.2/iv-32, YU-11000 Beograd.
 Luksemburgo: Robert Hoegener, 4 rue des charbons, Esch/Alzette.
 Kanado: vidu Nordameriko.
 Kolombujo: prof. Manuel Angel M., Apartado Aéreo 50179, Medellin.
 Koreujo: –
 Malagasujo: prof. Eugene Raveloson, BP 127, Tananarive.
 Nederlando: Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl.
 Nordameriko: John L. Lewine, West Stockbridge, MA 01266.
 Norvegujo: Margrete Landmark, Universitet i Oslo, Psykologisk Institutt, Postboks 1094, Blindern, Oslo 3.
 Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 1 Wood street, Upper Hutt.
 Polujo: –
 Rumanujo: –
 Sanmarino: prof. Marina Michelotti, via xxv marzo 73, I-43031 Rep. San Marino.
 Sovet-unio: Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV.
 Svedujo: Nikolaj Starodubĉev, poŝtrestante, SU-340047 Doneck.
 Svisujo: Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund.
 Usono: Olivier Tzaut, CH-2610 Mont-Soleil.
 vidu Nordameriko.

Izolitaj membroj

- Ĉeĥoslovakujo: Karel Kraft, Zupanovice 49, ĈS-26214 Hřimezdice Okr. Pribram.
 Germana D.R.: d-ro Till Dahlenburg, Str. d. DSF 13, DDR-2722 Brüel.
 Irano: M. Saghafian, Siras ave., Emdadi st. 22, Vanak, Teheran 19.
 Kubo: Pedro Pablo Lamas Díaz, apartado 223, Ciego de Avila.
 Singapuro: Hongi Liao, apt. blk. 14, 2809 H, Eunon Crescent, Singapuro 14.
 Zairujo: Antoine-Samuel Nkangu, BP 13, Lukala, Nkandu.

Kunlaborantaj organizoj

- FIMEM Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne.
 SAT Sennacieca Asocio Tutmonda.
 UEA Universala Esperanto-Asocio.
 UNESKO Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj.

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO – IPR

organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – ILEI
en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, kategorio C

Aperas trifoje jare

Redaktas: Gaston Turin, 43 rue E. Magnin, F-25300 Pontarlier, Francujo

Poŝtĝirkonto: Stockholm 682 117-7, Olle Olsson, Bantorget 3, S-222 29 Lund, Svedujo

Jara abono: 20 svedaj kronoj

La abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI

Nemembroj de ILEI pagu al la supre indikita konto.